



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 265

Komenco de nia 23a jaro de seninterrompa eldonado

Majo, 2008

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto

Stevens Norvell — Kompostisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆

MI TRANSLOKIĜAS AL LA URBO ST. JOHN'S EN NOVLANDO

Informo por ĉieaj amikoj

Homo kiu alvenas en sufiĉe bona sanstato al la maljuna aĝo estas benita kaj bonŝanca kaj rajtas feliĉi pri tio. Kiam oni perceptas, malgraŭ tio, ke iom post iom la korpo komencas kadukiĝi kaj febliĝi, oni devas pripensi kaj plani pri la estonteco.

Mi jam havas okdek kvin jarojn. Antaŭ 47 jaroj mi alvenis en Halifakson por instrui ĥirurgion en la Medicina Fakultato de la Universitato Dalhousie. Dum pli ol kvardek jaroj mi loĝis en granda apudlaga domo, kaj ĉi tie miaj du gefiloj kreskis de etinfanoj ĝis maturaj homoj. Ĉi tie mi loĝis inter miaj ses mil libroj, ĉi tie mi studis, ĉi tie mi strebis regi Esperanton, ĉi tie mi verkis en la angla artikolojn pri medicinaj eltrovaĵoj kaj en Esperanto pri preskaŭ io ajn. Ĉi tie mi bonvenigis amikojn kaj gastigis vojaĝantajn esperantistojn.

Nun mi loĝas sole. Jes, ja, mi vizitas amikojn kaj ili venas por esti miaj gastoj, sed plejparte mi estas sola. La domo estas tro granda por mi. La prizorgo de la pluretaĝa domo maltrankviligas min. Ĉiujare la ŝtuparo fariĝas pli kruta. Kaj la gefiloj kaj genepoj loĝas ĉe kontraŭaj randoj de la nord-amerika kontinento, kaj mi sentas la mankon de ili.

Antaŭ unu jaro mi faris gravan decidon — grava almenaŭ por mi. Miaj filo kaj bofilino, Theodore kaj Cheryl, en la urbo St. John's en Nov-Lando, bonkore invitis min veni kaj fariĝi parto de sia familio. Mi helpis ilin aĉeti taŭgan domon en sakstrato kaj apud parko. En la domo estas apartamento kiu estas kaj privata kaj parto de la domo, laŭ elekto. Mi havos tie multajn librojn, sed kompreneble ne

ĉiujn kiujn mi nun havas. Mi havos komputilon kaj presilon. La Universitato Memorial kaj la urba biblioteko estos nur tri stratojn for de la domo.

La plej grava afero estas, ke mi fariĝos membro de la familio de la filo kaj bofilino, kaj mi anticipas tion. Mi aparte anticipas mian rolon kiel avo, ĉar tie loĝas unu el miaj nepinoj, Saskia, jam okjaraĝa. Ĝis nun mi estas por ŝi nur avo de vizitoj, leteroj kaj telefonvokoj. Baldaŭ mi havos la bonokazon ĉiutage vidi kaj interparoli kun ŝi. Mi povos fariĝi parto de ŝia vivo, kaj, se mi sufiĉe longe vivas, observi ŝin maturiĝi ĝis junulino. La ŝanĝo en mia vivo estos kvazaŭ rangaltiĝo de emerita profesoro ĝis plentempa avo.

Mi imagas, ke mi daŭre verkos kaj korespondados en Esperanto. Mi esperas, ke mi daŭre studos matematikon en la oportune apuda universitato. (Tiurilate, estos oportune ankaŭ, ke mia filo estas matematikisto kaj instruas komputilan inĝenierion en la tiea universitato.) Mi antaŭvidas riĉan vivon dum la sanstato kaj menskapablo daŭras; se ili degeneras, almenaŭ mi estos kun familio.

Mia nova adreso estas: Stevens Norvell
4 Cork Place
St. John's, NL
KANADO A1B 2W4

Mi translokiĝos je la 20a de junio, 2008. Tamen, eĉ nun letero al mi ĉe la nova adreso atingos min, kaj dum tuta jaro post la translokiĝo letero al la malnova adreso ankaŭ atingos min.

Por informo de legantoj kiuj ne estas kanadanoj, mi diru ion pri *NovLando*. Mi elektas tiun formon en Esperanto, pro tio ke la nomo en la latina estas *Terra Nova*, en la franca *Terre-Neuve*, en la angla *Newfoundland*. NovLando estas kaj insulo kaj provinco de Kanado. La insulo, kiu troviĝas en la Atlantiko, grandas je pli ol cent mil kvadrataj kilometroj (pli granda ol Hungario), kaj estas la plej orienta antaŭposteno de Kanado kaj NordAmeriko. Oni ofte misuzas la saman nomon por indiki la provincon kies ĝusta nomo estas *NovLando kaj Labradoro*. Labradoro estas norda de NovLando kaj estas parto de la kontinenta ĉeflando de Nord-Ameriko. Kune la du partoj de la provinco enhavas pli ol kvarcent mil kvadratajn kilometrojn. Mi esperas estonte verki priskribartikolojn pri la al mi nova provinco.

Mi nur diru nun, ke la insulo NovLando estas lando de montoj, riveroj kaj arbaroj. Super ĉio, ĝi estas lando de marbordo. La klimato plejparte ne taŭgas por agrikulturo. La setlintoj el Eŭropo antaŭ jarcentoj venis al tiu insulo por fiŝkapti, kaj kvankam, por kiu ajn kialo, la riĉeco kaj malavaro de la maro malaperis en la lastaj jaroj, la homoj plejparte loĝas ankoraŭ ĉe la marbordo. Estas sur la tuta insulo malpli ol duonmiliono da homoj. La novlandanoj estas unika popolo; ili estas fortikaj kaj harditaj de izoleco, malriĉeco kaj severa klimato. Mi esperas

interkonatiĝi kun ili kaj lerni. Estos granda sperto kaj aventuro por mi. Iam, kiam mi estas preta, mi esperas verki ion por priskribi ilin por vi.

La provinca ĉefurbo, St. John's, estas ĉe la orienta marbordo de la insulo. Ĝi frontas al la Atlantiko. Oni fondis en tiu loko daŭran kolonion jam en la jaro 1610, kaj pro tio oni povas diri, ke ĝi estas la plej malnova urbo fondita de britoj en NordAmeriko. Ĝi havas ĉarman etan havenon, kaj la buntaj diverskoloraj domoj el ligno sur krutaj stratoj ĉirkaŭ la haveno konsistigas bildigindan vidon.

La vivo estas vojaĝo. Oni neniam scias pri kia surprizo aŭ aventuro sekvos en la venonta tago. Mi anticipas la translokiĝon al NovLando. Eble ankoraŭ atendas min la plej interesa kaj ĝojoplena parto de mia vivaventuro. Ni vidos. Kaj mi esperas iam verki por vi priskribon pri la venontaj vivspertoj tie.

— Steĉjo

NOVA ESPERANTO-KLUBO EN NOV-SKOTIO

Dum preskaŭ tri jaroj, mi ne instruis Esperanton en lernejo, sed nuntempe mi gvidas Esperantan Klubon en Cavalier Drive School (Kavalirvoja Lernejo)*. Tiu sufiĉe granda lernejo situas en Lower Sackville, antaŭurbo de Halifakso, la ĉefurbo de Nov-Skotio, en orienta Kanado.

Unue, permesu al mi rakonti pri la naskiĝo de tiu Klubo. Antaŭ du jaroj, Johano Green aniĝis de nia eta Rondo. Li estas memlerninta komencanto kiu kredas, ke Esperanto estas bona lingvo kaj ege taŭga por internacia interkompreno kaj komunikado. Li loĝas en Lower Sackville, kune kun sia edzino kaj tri gefiloj. Nia rondo estis lia unua renkonto kun esperantistoj. Unufoje li demandis al mi, ĉu mi volus instrui Esperanton al infanoj en lernejo. Mi jesis, kaj ni parolis iomete pri tiu afero. Tamen mi avertis lin, ke ne estas facile interesigi la edukajn instancojn pri Esperanto.

Dum frua oktobro pasintjare, hazarde tri amikinoj el Japanio vizitis nin - Chizuko Nishi, mia plumamikino, kune kun sia filino, Yoko, kaj kun Tomoko Yamane, amikino de Yoko. Dufoje antaŭe Chizuko kaj Yoko vizitis nin, kaj ni ĉiam ĝuis ilin ĉar ili estas afablaj kaj amikaj virinoj. Yoko (kiu ludas orkestran kornon) kaj Tomoko (kiu ludas violonon) estas muzikistoj, kiuj ludas en simfonia orkestro en Osaka, Japanio. Chizuko kaj mi estas preskaŭ kiel fratinoj ĉar ni korespondis esperante dum pli ol dudek jaroj, unue per paperaj leteroj kaj nuntempe plejparte retpoŝte. La muzikistinoj bone distris nian rondon per konĉerteto ĉe posttagmeza kunveno dum la vizito, sed Johano ne povis ĉeesti la rondo-kunvenon. Do mi sugestis, ke li kaj la gefiloj vizitu nin poste. Li jesis kaj Johano, James, Joseph, kaj Janelle venis tiun vesperon. La geinfanoj tre plaĉis al niaj japanaj vizitantoj kaj reciproke. Fakte, Yoko kaj Tomoko afable permesis, ke la geknaboj provu ludi

iliajn instrumentojn, kaj eĉ iomete instruis la infanojn. Ni ĉiuj multe ridis kiam ili faris tion, ĉar tiam ni aŭdis multe da bruoj, sed bedaŭrinde, malmulte da vera muziko.

Poste, Johano parolis kelkfoje kun Don Rearden, la lernejestro de Kavalirvoja Lernejo (kie studas la tri gefiloj de Johano), pri la valoro de Esperanto kiel pontlingvo en la lernado de fremdaj lingvoj. Li fine aranĝis renkontiĝon por mi kun Don. Mi klarigis al li, ke mi dezirus fari prezentadon pri Esperanto al la junaj lernantoj el la 3-a ĝis la 6-a klasoj inkluzive, kaj iliaj instruistoj, kun la celo iniciati Esperanto-Klubon. Li konsentis, do Johano kaj mi renkontis kun Don la 4-an de januaro, 2008, kaj ni faris prezentadon al studentkunveno en la gimnastikejo. La venontan vendredon, la klubo kunvenis en la lerneja biblioteko, kaj Johano, la lernejestro kaj kelkaj geinstruistoj rigardis kiam mi instruis Esperantan lecionon. Kvardek lernantoj aliĝis la Klubon sed, kompreneble, ne ĉiuj ĉeestis tiun kunvenon. Ekde tiam, ni kunvenis ĉiun vendredon dum la lunĉohoro, kaj tio signifas, ke mi instruas dum malpli ol 45 minutoj ĉiun kunvenon. Mi utiligas la kurson „Dek Demandoj” kiel lernilon. Mi ankaŭ montris unufoje la unuan lecionon de „Mazi” al la klubanoj. Ili ĝuis la videon, eĉ se ili ne povis bone kompreni la paroladon. Nun, restas nur 17 klubanoj, sed ili vere volas lerni kaj uzi Esperanton. Ili bone kantas esperantajn kantojn, ludas „Dek”, skribas kaj, kompreneble, parolas Esperanton en la nova klubo.

Katalin Kovats sugestis al mi, ke ŝi faru anoncon pri la nova klubo en la retpaĝo de <edukado.net>. Pro tio, ĝis la fino de aprilo, ni ricevis 22 belajn poŝtkartojn el Finnlando, Svedio, Britio, Germanio, Nederlando, Aŭstrio, Francio, Hispanio, Ĉeĥio, Norvegio, Brazilo, Japanio, Portugalio, Meksiko, kaj Kanado. Ni sendis dankkartojn al tiuj, kiuj skribis siajn adresojn sur la kartoj, kaj la ricevitaĵojn ni metis en belan liberfolian kajeron tiel ke oni povas vidi la du flankojn de ĉiu karto kaj anglan tradukadon de la skribita esperantlingva mesaĝo. La Klubo ricevis donacon de 35 ekzempleroj de la mirinda bildvortaro por komencantoj “Poŝamiko” de Steĉjo Norvell. La klubanoj kaj mi sincere dankas Steĉjo-n pro tiuj belaj kaj utilaj libretoj. Mi donos unu ekzempleron al ĉiu klubano kaj la ceterajn ni vendos por gajni monon, kiun ni utiligas por aĉeti poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn, ĉar ili volas korespondi kun aliaj esperantaj klasoj.

Tio, mi esperas, ne estas la fino de mia rakonto ĉar mi esperas, ke la klubo daŭros. Mi estas nun kontenta, ĉar mi povas denove ĝui la sperton instrui nian karan lingvon al geknaboj.

— Kim Keeble

* La Lerneja Esperanto-Klubo de Kavalir-Vojo